



PILO-PRESS

Internacia
Informservo

Legu pri novaĵoj

el Bona Espero
sur paĝo 2!

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 38/76 - 24 sep 1976
Aperas ĉiusemajne

Pri Eŭropa Esperanto Centro

Schoorl (pp/eec) - La 5-an de aŭgusto 1976 okazis kadre de la 61-a Universala Kongreso de Esperanto en Ateno la jarkunveno de Eŭropa Esperanto Centro por la landoj de la komuna merkato (EEC). Ĉeestis 26 personoj.

D-ro Pol Denoel malfermis la kunvenon kaj eksplikis ke la ĉefa tasko de EEC estas la informado al eŭropaj institucioj. Kiel rezulto de trijara laboro nun, por la unua fojo, la kongreso ricevis salutleteron de la Eŭropa Parlamento, kaj delegito de la Eŭropa Komunumo oficiale vizitis la kongreson, nome s-ro J.S. Pignot, la direktoro de la traduka servo de la Eŭropa Komisiono pri Informado. S-ro Pignot konfesis, ke ekzistas lingvoproblemo en la Eŭropa Komunumo kaj ke tiu fariĝas pli komplika kaj kompleksa.

La rilatoj kun s-ro Govaers, la ĝenerala sekretario de la Centro por Eŭropa Edukado rezultis al pli firmaj kontaktoj kun la Eŭropa Instruista Asocio. La Esperanto-eldono de "Eŭropa Dokumentaro" urĝe bezonas pli da abonantoj por certigi la daŭran eldonon.

La rilatoj kun la Landaĵ Asocioj nepre fariĝu pli bonaj kaj pli firmaj. Kun la Komisiono por Eksteraj Rilatoj de UEA (KER) la EEC konsentas pri la fondiĝo de Eŭropa Esperanto Unio (EEU), kiel proponita dum kunsido de KER en Ateno.

En Bruselo fondiĝis EK-laborgrupo. Ĝi konsilas EEC-on, informas kaj proponas partoprenon al eventoj de eŭropaj institucioj. Ankaŭ en Luksemburgo oni aktive laboras sub la gvido de pastro H.J. Kindler. En Strasburgo ĝis nun mankas kontaktoj.

EEC sendis informojn al la membroj de la Eŭropa Parlamento, i.a. la rezolucion de la Eŭropa Esperanto Kongreso en Eindhoven 1976. La rekta elektado de la Eŭropa Parlamento estas nun en preparo, ĉi-rilate troviĝas grava tasko por la Esperanto-movado.

EEC nun havas limigitajn kontaktojn kun la EK-institucioj pri Edukado, Informado kaj kun unuopaj membroj de la Eŭropa Parlamento. La tereno de nia laboro nepre restu limigita al aferoj de la instruado, edukado kaj informado kaj turismo. Por ĉi tiuj taskoj jam nun estas tro multaj kunlaborantoj. Por pli bona funkciado de EEC aŭ estonta "Unio" d-ro Denoel proponas starigi Konsultan Komisionon de "Eŭrokratoj", kiuj favoras Esperanton, por konsili al ni kiun vojon ni sekvu. Restas la deziro ke la sekretariojo translokiĝu al Bruselo.

El esperantista vidpunkto la Eŭropa Esperanto Kongreso Eindhoven 1976 estis sukceso, sed fakte nur tri landaĵ asocioj ĝin organizis. Ne estis tempo por pritrakti eŭropajn problemojn. La tri Landaĵ Asocioj nur aranĝis siajn naciajn kongresojn anstataŭ la eŭropan kunlaboradon. En vera Eŭropa Kongreso partoprenu minimume ĉiuj Landaĵ Asocioj de la EK-landoj.

La rilatoj al la Eŭropa Movado dependas de la aktiveco de lokaj kaj landaj Esperanto-grupoj. Ekzistas broŝuro de la Eŭropa Movado en Esperanto kun la titolo "Kio estas, Kion volas, Kion faras la Eŭropa Movado". Ĝi estas havebla ĉe Eŭropa Movado, Aleksanderstr. 2, Den Haag, Nederlando.

(Laŭ la protokolo de la kunveno.)

Novajoj el Bona Espero

Alto Paraiso (pp) - Aperis dua numero de "Voĉo el Bona Espero", el kiu ni citas:

"Karaj geamikoj de Bona Espero

Nia unua "voĉo" estis tre ŝatata de la legantoj, kiel atestas la multaj leteroj ricevitaj. Sekve, ni estas preskaŭ devigitaj aperigi duan numeron por ne atendigi tro longe niajn korespondantojn.

Cetere, la ekde-februara plialtigo de la brazilaj poŝtaj tarifoj (ĉ. 60 %), metis en krizon la delikatan buĝeton de Bona Espero. Farigis por ni tre malfacile respondi al ĉiuj per aparta letero, kies aerpoŝta afranko por Eŭropo kostas nun la ekvivalenton de 1,5 kg da rizo. Do, la bonesperanoj troviĝas antaŭ la dilemo: ĉu kuiru supon aŭ forsendi leteron? La solvo estas preteco de nia samideano Torben Kehlet helpi al ni per plua aperigo de nia bulteno."

Krome oni povas legi en la dua bulteno pri "Intensa trafiko en la flughaveno de Bona Espero" kaj ke la 16-an de februaro 1976 oni inaŭguris la unuan postelementan lernejon de la regiono vasta kiel Svislando. El la 6 geinstruistoj, kvar estas bonesperanoj kaj danke al la esperantistoj oni faris pluan paŝon al plialtigo de la loka eduka nivelo.

Dum la lasta jaro entute 20 eksterlandanoj vizitis Bonan Esperon. Ĉiuj atingis Bonan Esperon per pli malpli aventura vojaĝo, sed la rekordo tiurilate apartenas al Sally Brabenec. Ŝi flugis de Londono al Novjorko kaj de tie petvojaĝis ĝis Brazilo. La veturado daŭris kelkajn monatojn kaj ŝi ofte riskis perdi en tiu ĉi vasta kontinento.

Ĉe la limo de Bona Espero, monteto estis eknomita "Monteto Zamenhof", sur kiu oni baldaŭ inaŭguros buston de Zamenhof.

Ĝis fine de julio 1976 Bona Espero ricevis donacojn de esperantistoj en valoro de 3 400 usonaj dolaroj. Por kio oni uzis la monon oni povas legi en la bulteno: "Per via helpo ni renovigis la vestaron de niaj infanoj kaj aĉetis novajn matracojn. Krome ni aĉetis kaj transportis konstruan materialon por iom post iom fini niajn domojn (cemento, kalko, tegoloj, pordoj, fenestroj, kaheloj, k.t.p.) Niaj prioritataj planoj ĝis fino de la seka sezono antaŭvidas riparon de la tegmento de nia lernejo kaj plibonigon de niaj paŝtejoj per plugado kaj semado de nova greso. Unu el niaj ambiciaj planoj estas ankaŭ krei en Bona Espero grandan Esperanto-bibliotekon kaj tiucele ni jam estas ordigantaj la ekzistantan materialon."

Kiu volas subteni la laboron kaj la iniciaton de Bona Espero, povas ĝiri siajn donacojn al jena konto: "Bona Espero Conta n-ro 34.300-30 do Banco Francês e Italiano para a America do Sul-SUDAMERIS - Agencia Brasilia" aŭ al Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 3002, Nederlando kun la indiko favore al konto Bona Espero.

La poŝta adreso de Bona Espero estas: Fazenda-Escola Bona Espero, 77260 Alto Paraiso, Goiás, Brazilo.

Ĉefkunveno de AEF

Leoben (pp) - La 9-an de oktobro 1976 okazos la 32-a ĉefkunveno de Aŭstria Esperantista Federacio en la stiria urbo Leoben. Pro tranoktejo oni sin turnu al s-ro Franz Schick, Erzstr, 11, A-8704 Leoben. Dimanĉe, la 10-an de oktobro estas antaŭviditaj ekskursoj.

La tagordo de la ĉefkunveno antaŭvidas la kutimajn erojn inkl. nov-elektojn.

Labari en Paderborn

Paderborn (pp/hb) - La FEoLL-Instituto pri Kibernetika Pedagogiko en Paderborn, FR Germanio, havas kelkajn liberajn laborlokojn por sciencistoj kaj instruistoj ekde la 1-a de januaro 1977 por novaj esplorprojektoj agnoskitaj. Kiel la direktoro de la Instituto, prof. ĉ-ro Helmar Frank skribas, oni akceptas prefere aspirantojn el landoj de la Eŭropa Komunajo.

Ĉefaj antaŭkondiĉoj estas, ke la estontaj kunlaborantoj iom scias la germanan lingvon kaj bone Esperanton, kaj ke ili krome ne estu "tro for de la kibernetike-matematika pensmaniero". Kvalifikitaj interesusuloj havos en Paderborn la eblecon verki doktorigan disertacion k.s.

Informas Institut für Kybernetische Pädagogik, Postfach 1567, D-4790 Paderborn.

Esperanto en Waiblingen

Waiblingen (pp/hb) - Momente 100 elementlernejaj infanoj en Waiblingen studas la Internacian Lingvon. Instruas Goar Engeländer, helpis Karl Trimborn, asistas nun Christf Roether el Darmstadt.

Sed malfacila montriĝis ĝis nun la serĉado resp. la trovado de surlokaĵ instruistoj, kiuj poste mem transprenu tiujn 6 kursojn.

Kiu povas helpi, konsili, sugesti? Turnu vin al FEoLL-Instituto pri Kibernetika Pedagogiko, Postfach 1567, 4790 Paderborn.

20-a Internacia Seminario de GEJ

Kassel (pp) - De la 27-a de decembro 1976 ĝis la 3-a de januaro 1977 okazos en la moderna junulardomo "Jugendburg Sensenstein" D-3501 Nieste, 15 km oriente de Kassel la 20-a Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo (GEJ)

sub la kadra temo "Demandoj pri Eŭropa Unuiĝo".

El la programo:

labora: Prelegoj pri diversaj aspektoj, laborgrupoj, kursoj

distra: Magia vespero kun fama konata Luksemburga Trixini
Diservo - Ekskursoj - Promenoj - Silvestra balo
GEJ en retrospektivo: 25-jara historio

Specialaĵoj: Naĝejo - Saŭno - Dumsemajna fotoservo - Aŭdvida surbendigo (propra iniciata filmado
...kaj multaj aliaj surprizoj.

Kotizoj: Ĝis inkluzive 25 jaroj 90,- GM (Pluspagoj por aliĝoj post pli ol 25 jaroj 110,- GM la 1-a de decembro!)

Por eksterlandanoj kaj GEJ-membroj estas konsiderindaj subvencioj!

La seminario sin turnas speciale al Esperanto-parolantoj! Komencantoj estas bonvenaj, sed ili estas petataj partopreni porkomencantajn kursojn.

Petu aliĝilojn de Hans-Dieter Platz, Maikammerer Str. 21,
D-6731 St. Martin, tel. 06323/5982

Pilo-Press, Internacia Informservo aperas ĉiusemajne. Jara abonkotizo 30,- DM/GM, pagebla al Ludwig Pickel, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1, Pöschk Nürnberg 819 56-851 aŭ Stadtparkasse Nürnberg 1.901.579

Esperanto en radio

Heidi pri Heidi

Svisa Kurtonda Servo. En la serio de prelegoj de d-ro Arthur Baur ĉi-semajne s-ino Heidi Baur parolis pri "Heidi", la komata rakonto de Johanna Spyri pri historio de svisa knabineto, kies sorto tuŝas la koron kaj rakontas profundan veron. De tiu knabino Heidi multaj homoj en la tuta mondo formis sian koncepton pri Svislando. Kaj ankoraŭ hodiaŭ la aŭtorino Johanna Spyri, kiu mortis antaŭ 75 jaroj kaj kies "Heidi" aperis antaŭ 96 jaroj, estas la plej legata svisa verkisto, multe pli ol Frisch, Dürrenmatt aŭ la svisaj klasikuloj. "Heidi" ne nur estas preferata libro de la svisaj infanoj, ekzistas tradukoj en 40 lingvoj. Nur Esperanto-eldonistoj rifuzis antaŭ kelkaj jaroj eldoni la Esperanto-tradukon.

Ges-roj Gacond forlasis Esperanto-temojn kaj komencis novan serion pri la "ora karbo", la sunenergio. Ili rakontis pri vizito al ekspozicio pri la apliko de sunenergio.

Varsovio. En la Esperanto-Ekspreso oni povis aŭdi interesan intervjuon kun la redaktorino de Heroldo de Esperanto, s-ino Ada Fighiera-Sikorska. Laŭ ŝi Heroldo de Esperanto estas ĉefe informa gazeto, ĝia pliampleksigo dependas de la kresko de abonantaro. La redakcio ne havas intencan transformi la revuon en iun "Magazinon", kiel kelkfoje esperantistoj proponas tian revuon.

Pri la vizito de la aŭstria kanceliero Bruno Kreisky en Pollando oni povis aŭdi en la "Panoramo de internaciaj eventoj" jenon: "En la pasanta semajno venis al Pollando por neoficiala vizito la kanceliero de Aŭstrio, Bruno Kreisky. Malgraŭ la neoficiala karaktero de la renkontiĝo ĝi estas okazo por interŝanĝi opiniojn same pri la pliintencigo de la bone evoluantaj ĉiuflankaj kontaktoj polaj-aŭstriaĵoj kiel ankaŭ pri kelkiuj internaciaj demandoj interesantaj ambaŭ landojn. Aŭstrio apud Svedio kaj Finnlando apartonas al tiuj ŝtatoj de Eŭropo kies solidigo de aktiva neŭtraleco estas reala kontribuo al la disvolvado de la paca kunlaboro inter la ŝtatoj. Ja ne estas afero de hazardo ke la ĉefurbon de Aŭstrio, Vienon, oni elektis kiel la lokon de gravaj internaciaj konferencoj. La eksterordinare gravaj laŭ la vidpunkto de militara malstreĉeco intertraktoj pri la afero de reduktado de armigoj kaj armeaj fortoj en la Centra Eŭropo daŭras ĝuste en Vieno. Oni do devas atendi ke la neoficiala renkontiĝo de la ĉefoj de la registaroj de Pollando kaj Aŭstrio kontribuas al interkonsentoj avantaĝaj same por la senperaj partoprenintoj de la interparoloj kiel ankaŭ por la situacio sur nia kontinento."

Vieno. Ankaŭ la Esperanto-elsendoj de ORF traktis la viziton de Kreisky en Pollando en la semajna komentario verkita de d-ro Alfred Macher. En tiu komentario oni diris i.a.: En la pasinta jaro la ĉefoj de multaj registaroj kaj ŝtatoj, konferencante en Helsinki, decidis ne nur pri agnosko de la nunaj limoj, sed ankaŭ pri pli libera interŝanĝo de opinioj trans tiujn limojn, pri pli da homaj kontaktoj kaj pli da vojaĝlibereco, ankaŭ en direkto el la oriento al la okcidento, tra ĝuste tiu multcitata "fera kurteno". Ĝis nun tre malmulte el ĉio tio realiĝis. Ĉar nek ĉiam nek nepre, la komunistoj interpretas la vorton "libereco" en ties okcidenta senco. En tiu ĉi semajno la aŭstra Federacia Prezidento Rudolf Kirchschläger detale parolis - en Sofia - pri tiu problemoj kun la bulgara ŝtatestro Schiwkoff; kanceliero Bruno Kreisky pasintsemajne kun Kadar, ĉefo de la hungaraĵa partio kaj registaro. Kaj nun li debatas pri la temo "Helsinki hieraŭ, hodiaŭ kaj morgaŭ" en Pollando kun ties plej elstaraj politikistoj. Oni ne atendu spektaklajn rezultojn. Sed iomete la frontoj moliĝos, probable, dum la venontaj monatoj..."

Cetere, Vieno kaj Varsovio, samtempe disaŭdigis saman artikolon pri la "Pola Kulturinstituto en Vieno kaj ĝia rilato al la aŭstraj esperantistoj", verkita de d-ro Karl Beckmann.